

& Laŭ ĉies plaĉo:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 473 paŝoj dum 6 minutoj, aŭ rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 682 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo (#Unuan 2015 kaj #Duan 2016).>

(#Melodio:

(#Unua: <:43> mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi doTi domi mido Ti Ti;re doLa doTi LaSi La La;

(#Rekantaĵe: mi domi so somi re do; fami doTi Lado Ti Ti; mido domi somi re; mi domi so somi re do o))×11

?

(#Dua: <:31> o;mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi domi so somi re do; fami doTi domi re re; mido domi somi re e;mi domi so somi re do)×22

)+

(&Strofoj:

'1 (&Unua:

La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro. (×:;) La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ; Gravas kion ili diru ; Kun azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies plaĉo ni iru.**)

(&Dua:

La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ; Gravas kion ili diru ; Kun azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies plaĉo ni iru.**)

La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ; Gravas kion ili diru ; Kun azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies plaĉo ni iru.**))

'2 Survoje venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! Jen viro en la sel' komforta, ; dum marŝas la infan' malforta."

'3 La patro, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, de la azeno do descendis ; kaj rajdi sian filon sendis.

'4 Sed ree venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! Jen knabo en la sel' komforta, ; dum marŝas la aĝul' malforta."

'5 La knabo, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, do saltis de l' azena dorso. ; Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso.

'6 Sed venis homo, miris multe, ; kaj kriis: "Vere, estas stulte! Dum vi lacigas vin per marŝo, ; promenas la azen' sen ŝarĝo."

'7 Do, kion fari? Patro, filo ; demandis sin kun maltrankvilo. Interkonsilis kaj decidis: ; Nun ambaŭ en la sel' eksidis.

'8 Sed ree venis hom' renkonte, ; indignis ege: "Estas honte! Sur povra besto ŝarĝ' duobla! ; Fi, kia kruelec' malnobla!"

'9 La du, en malesper', per ŝnuroj ; l' azenon ligis ĉe la kruroj, kaj ĝin per stango traŝovita ; plu portis kun klopodo ŝvita.

'10 Sed venis hom' kaj ĝis eksceso ; ridante kriis: "Jen frenezo! Azenon vivan oni portas! ; Ho ve, mi de ridego mortas!"

'11 La patro diris al la filo: ; "Mi estas vere sen konsilo: Ĉu la azenon do mortigi, ; aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"